

Theodor Fontane,  
Printempo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Finfine tamen venis ĝi  
Kun verda burĝonar',  
Parolas la arboj inter si:  
“Ĝi venis ja en ĉiu jar’.”<sup>2</sup>

Nun forte ili burĝonas jen,  
Jam longe atendis ĝin;  
La olda pomarbo en la ĝarden'  
Obstinas, sed devas je l' fin'.

Hezitas la maljuna kor',  
Ankoraŭ timas kaj  
Ja scias: „Mart' ne estas for,  
Kaj Mart' ne estas Maj'.”

Ho skuu la pezan sonĝon for,  
Samkiel tiu pomarbo ĉi:  
Vekiĝu fine, mia kor',  
Kuraĝu ankaŭ vi.

*Traduko de la Germana poemo “Frühling” de THEODOR FONTANE (Teodoro Fontano, \*1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-302-611 (2005-03-25 15:58:08)*

---

<sup>2</sup>aŭ: “Ĝi venis en ĉiu jar’.”